n-ro 79

januaro 2003

# La Merkato

ISSN 0941-9306

*Karaj gemembroj kaj ceteraj gelegantoj de La Merkato,*

*Ni deziras al vi feliĉan kaj prosperan jaron 2003, kaj esperas renkonti vin, ĉu persone okaze de la Universala Kongreso aŭ alia E-renkontiĝo, ĉu koresponde kunlaborante al iu IKEF-agado.*

*La Estraro de IKEF*

## Enhavo

Lawrence Mee, kunfondinto de IKEF, forpasis . . . . . . . . . . . . . . . 3
Stelo - Patronoj de IKEF - Lastminute . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4-6
Noavaj adresoj - Terminologio - Internaciaj pagoj malpli kostaj . . 7
Recenzo: Filmo pri Profesoro Selten . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8
Petoj por fari staĝon eksterlande (Azio) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
La Merkato rete legebla - Patentoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
Komunikoj de UEA . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11-12

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**:

- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12,

retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ http://users.pandora.be/ikef/



**Kunfondinto de IKEF forpasis**

Je 27 oktobro 2002 forpasis post mallonga malsano s-ro Lawrence Mee, Britio, naskiĝinta je 24 februaro 1922, dumviva membro de IKEF.

Li estis kun mi kunfondinto de IKEF (oficiale je 6 aŭgusto 1985 en Aŭgsburgo, dum la 70a UK). Tiam loĝante en Rotterdam pro sia antaŭa laboro en la Centra Oficejo de UEA, ekde la fondiĝo de IKEF li rolis Ĝenerala Sekretario kaj krome redaktoro de la tiama 'Laŭokaza Novaĵletero' (nia interkomunikilo antaŭ 'La Merkato') ĝis numero 26 de aprilo 1989.

Jam en la jaro 1984 komenciĝintis la korespondado inter li kaj mi por prepari la organizadon de nia fakgrupo kaj por ellabori la statuton (poste akceptitan en Aŭgsburgo kaj ĝis nun senŝanĝe validan). Mi bone memoras mian unuan personan renkontiĝon kun li, kio okazis dum la laborkunsido en Brugge, Belgio, je 19 aprilo 1985 en la domo de Roland Rotsaert. Tiun renkontiĝon kun manpremo pri decidita posta fondado atestas fotoj en Laŭokaza Novaĵletero n-ro 5 de aprilo 1985, paĝo 5. Laurence Mee estis ĉiam persistema 'negocanto' por siaj ideoj.

Lawrence Mee por ĉiam havos firman lokon en la analoj de IKEF. Ni gardos bonan memoron pri li.

Franz Josef Braun, Prezidanto

**Stelo**

Dum la lastaj jaroj de sia vivo, Lawrence Mee laboris pri la historio de la *stelo*, monunuo uzata en esperantaj medioj dum granda parto de la 20a jarcento. La malneta teksto troviĝas je http://groups.yahoo.com/ (nur legebla por membroj de la retlisto pri esperanta historio [ehist]). IKEF deziras eldoni tiun tekston (rete aŭ broŝurete), sed multaj informoj pri la *stelo* mankas. Kiu scias ion pri ĝi, kontaktu Roland Rotsaert.

**Patronoj de IKEF**

Profesoro OOBA Atsuo (IKEF 75, 20 EUR), Franz Josef BRAUN (IKEF 4, 40 EUR), Hans Bakker (Amsterdam, ne IKEF-membro, 10 EUR). Dankon al ili! Pluraj kontribu-antoj estas bonvenaj. (Vidu 'Alvoko al niaj membroj' en La Merkato n-ro 78, paĝo 1)

**Lastminute**:
* Mi deziras aĉeti CDojn, produktitajn en Ĉinio pri ĉinaj muzikoj kaj lerno-libroj. Interesitoj turnu al

mia retadreso: esperant(a)unitel.co.kr, LEE Sung-woo, Seulo, Koreio
* Nia grupeto volas kunlabori kun eksterlandaj komercistoj en ĉiuj kampoj. Saidnabi Noeobov, saidnabi(a)tgmu.tajik.net, Duŝanbe, Taĝikio.





## Komercaj petoj kaj proponoj

IKEF senpage aperigas komercajn ofertojn, laŭ peto de membro aŭ de alia persono. Tamen, ĝi ne kapablas kontroli la kvaliton de la ofertoj. Estas la respondeco de komercistoj laŭ kutimaj proceduroj esplori la fidindecon de la ebla nova partnero kaj/aŭ per specialaj teknikoj limigi la riskon.

### Ĉinio

Ĉu vi volas importi el Ĉinio? Ĉu vi volas eksporti al Ĉinio? Ĉu vi volas serĉi partneron en Ĉinio? Sendu vian anoncon al Xinyang Esperanto-Asocio, kiu havas retpaĝaron en granda ĉina komerca retejo, kaj volonte reklamas SENPAGE por vi en tiu retejo. Retadreso: kunlaboro(a)sina.com.

Ni konstante eksportas jenajn produktojn:

| | |
|---|---|
| 1. Portebla VCD: | Tute akordigebla kun CD/MP3/VCD/SVCD<br>Prezo: USD 26.50/PC, FOB SHENZHEN |
| 2. Famlia VCD: | a) Tute akordigebla kun CD/MP3/VCD/DVCD<br>Prezo: USD 25.50/PC, FOB SHENZHEN<br>b) Nur plej bazaj ekipaĵoj<br>Prezo: USD 20.00/PC, FOB SHENZHEN |
| 3. CD: | Formo kiel portebla VCD<br>Prezo: USD 24.50/PC, FOB SHENZHEN |

Pliajn informojn kaj fotojn de la produktoj petu ĉe s-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. Retpoŝto: kunlaboro(a)sina.com.

* Sunvarma kuirilo, po 77 USD
* Motorciklo 3-rada por tertransportado, eblas kunporti 500-700 kg, po 640,27 USD
* Motorciklo 3-rada por veturigi gastojn, po 877,55 USD
* Ŝtofo, larĝeco je 1,46-metroj (nur kalkulas laŭ ĝia longeco, malgraŭ larĝeco), 1 metro: po 1,95 USD
* Ŝtofo, larĝeco je 1,15 metroj, 1 metro: po 1,04 USD
* Brando kun ujo, 1500 gramoj (brando 1250 gramoj) po 2,42 USD
* Silko, 1 metro: po 0,8 USD
* Lesivo, 10-kg, po 5,1 USD
* Sapo, 180-gramoj, po 0,3381 USD
* Elektra biciklo, po 610,83 USD

Prezoj FOB ĉina haveno. Oni bonvolu mem kalkuli la martransportadon, la tertrans-

portadon kaj la asekuron. Krom tiuj ne estas aliaj kostoj. Kontaktu Chen jinyin (Chen dinshu). Reto: chentianyou2002(a)yahoo.com.cn, deichenquanliao(a)sina.com.cn, gemidolf100128(a)sohu.com.

Por komercistoj de konstrumaterialoj kaj koncernaj entreprenistoj, mi ofertas EMAJL-KOLORIGAN SABLON (ENAMELLED SAND). Estas novtipa malmola materialo de konstru- kaj ornamad-painto, medioprotekta, bonkvalita kaj abund-kolora, brulo-, akvo- kaj korodorezista, farata en Wuhan, Hubei. Kontaktu: Ji Ding, rete dingjiws(a)yahoo.com (fakdelegito de UEA, v. jarlibron 2002, p. 132; detalaj informoj pri la entrepreno estas je www.ikef.org, rubriko 'komercaj anoncoj'). Ni bonvenigas eksterlandajn komercistojn kiuj deziras viziti Wuhan.

**Irano**

Mia kompanio serĉas fremdan partneron por elektroniko-komerca projekto kiun ni jam realigis sukcesplene en Irano, unuafoje en la irana interreto-historio. Utiligante niajn servojn, iranoj jam kapablas aĉeti ĉiujn varojn kaj servojn el interretaj vendejoj tra la tuta mondo tute aŭtomate. Bonvolu kontakti min por pliaj informo kaj negoco. Telefono : +98 21 2204000 & 2202211, telefono kaj fakso: +98 21 2239303, rete e-commerce(a)mahvar.com, Sadegh Karami, Tehrano.

**Kongo D.R.**

Progreso en Kongolando

Por ordigi la reagojn kiuj alvenis post la alvoko de UEA-prezidanto Renato Corsetti, kunsideto pri komerco kaj ekonomio ĵus okazis en Kinshasa sub la tegmento de IKEF-anoj kaj -simpatiantoj. Dum ĝi, oni decidis kunordigi ĉiujn petojn kaj proponojn por investado aŭ komerco de eksterlandaj E-istoj en nia lando. Do, estis kreita
Kongolanda Komerco-Reto (KKR) por eviti ĉiuspecajn misuzojn de mensogemuloj (kiel okazas ofte en Niĝerio kaj aliaj afrikaj landoj laŭ la anoncoj en kelkaj revuoj). Sufiĉas antaŭanonci sin al ni. Provizore perpoŝte: KKR, B.P. 761, KINSHASA XI, D.R. KONGOLANDO. Ni baldaŭ sciigos la retadreson.

Emile MALANDA NIANGA, kunordiganto de KKR (IKEF-ano), rete emalanda(a)caramail.com



'FLAM-esperanto-turo' estas sperta laborejo pri fabrikado da sukoj ekstraktitaj el ĉiuj tropikaj fruktoj. Ĝi produktas fortikaĵajn sukojn ekstraktitajn el zingibro kaj fruktogustajn sukojn. FLAM pretas kunlabori kun ajnaj kiuj interesiĝas alportante siajn kontribuojn por pligrandigi (produkti kvantege) la aferon, ekzemple enboteligo, etiketado kaj materialoj por havigi bonkvalitaj sukoj. Interesantoj bonvolu konigi sin al FLAM-respondeculo, S-ro Mbo Nsele Moyame, je flamcd(a)yahoo.fr, B.P. 14.518, CD-Kinshasa 1 (IKEF 282).

**Malio**

Komercistoj malianoj serĉas rizon por kunsumado de homoj. Ili bezonas unue specimenon (300 g) kiun la interesiĝantoj sendu al : Drissa, PGRN, BP 2382, Bamako, MALI, Afrique Occidentale (rete drissa_flayorod(a)hotmail.com aŭ drissa_flayoro(a)yahoo.com).

Oni aliĝu al jenaj kondiĉoj (donitaj kiel indika informo):

*Ĝenerale, por internacia transakcio, oni devas havigi la kontrakton unue kaj per ĝi la aĉetanto havigos la Leteron de Kredito (dokumentan krediton, angle 'letter of credit') kun sia banko por certigi ke kiam la varo estas sendata, la mono estos pagata. Ĉiam oni devas labori tra la banka sistemo.*

**Nepalo**

Mi volas kontakti ĉinajn entreprenojn kiuj produktas aŭ peras manfaritajn paperojn (*only paper sheets*) kaj ĝiajn aĵojn kiel gratulkartojn, albumojn, ktp. Ankaŭ estas serĉata pakumpapero kun formato 50x70 cm kun diversaj efikoj de floroj, herboj kaj folioj, en ĉiuj koloroj. Kabindra Espero Craft Enterprises, www.geocities.com/esperocraft, Kabindra Raj shakya, esperonepal(a)yahoo.com, Kathmandu.

**Taĝikio**

Mi estas Kholov Vaisidin, retadreso vajsidin(a)cada.tajik.net, poŝtadresoj: Duŝanbe, ul 50-let Taĝikistana.29-35. kaj Ŝahrinau, ul Savetabad.dom 33., tel.: 810 992 372 34 49 77, fakso: 810 992 372 21 63 57 . Mi naskiĝis 21.03.1971 en Ŝaĥrinaw kaj en la 2001 jaro finis medecinan universitaton. Mi havas 15-hektaran terenon por mastrumo, magazeno, stacio por teknika priservo de aŭtomobiloj, uzino... Eblas sendi al vi mian biznes-planon (projekton). Mi serĉas interesiĝintajn komercistojn, organizaĵon, fonduson... kiu povus investi monon por evoluado de Taĝikio kaj por reciproka profito.

Mi invitas vin viziti la landen, por propraokule vidi la eblecojn. Faldfolio (en angla lingvo) pri gemoj el Taĝikio estas havebla je ikef(a)pandora.be.
Kiu interesiĝinta komercisto pretus rapide (ĉar komenciĝas semada sezono) doni al mi krediton je 800-1000 eŭroj, por semi tritikon sur la 15 hektaroj? Post la rikolto, mi repagos la krediton.

**OSIEK-premio 2002**

Okaze de la IEK en Leuven, Belgio, la OSIEK-premio 2002 estis atribuita al Kreŝimir Barkoviĉ, pro traduko de '7000 Tagoj en Siberio' de K. Ŝtajner.

(La Gazeto, www.osiek.org , info(a)osiek.org)

**12a Ĉina Xinyang Teo-Festivalo**

Granda aranĝo por komerco kaj kulturo, en kiu Esperanto rolas pontlingve ekde 2001, okazos de la 18a ĝis la 21a de majo 2003 en Xinyang, Ĉinio. La organizanto honore invitas vian partoprenon kaj povas sendi al vi invitilon. Pli detalaj informoj aperis en retpaĝo:
www.esperantoland.org/renkontighoj/renkontighoL.php?renid=52.
Petu aliĝilon ĉe: teofestivalo(a)peoplemail.com.cn.

**Novaj (ret)adresoj**

101. Georges Sossois, Belgio georgecamille.sossois(a)compaqnet.be

237. James Zheng, Via Int'l Co., Ltd., 146/59 ABAC Townhouse, Soi 24, Ramkhamhaeng Rd., Huamark, Bangkapi, Bangkok, Thailand 10240; tel.: +66-2-3004361, mobila: +66-6-0292030, fakso: 66-2-3004361, reto james(a)ikef.org

252. André Mertens-Goossens, Belgio a.mego(a)skynet.be

**Terminologio: franĉizo = franchise?**

En LM 78, p. 10, estis starigita la supra demando. Ulrich Fellmann trovis en la vortaro



de la usonano Peter Benson, 'Comprehensive English-Esperanto Dictionary' por la angla 'franchise' (uzata en komerca signifo): koncesio; agenturo; koncesii [kaj ne 'franĉizo']

**Finfine: internaciaj pagoj malpli kostaj en Eŭropa Unio**

Baldaŭ (en Belgio meze de 2003) por bankĝiroj ĝis 12.500 eŭroj ene de la Eŭropa Unio (EU) validos la tarifo por enlandaj pagoj. Por ĝui la tarifon necesas uzi la internacian bankkontonumeron (IBAN) kaj la internacian bankkodon (BIC, antaŭe 'Swift'). La bankoj havigos tiujn kodojn al siaj klientoj. Ili menciu ilin sur sia leterpapero, fakturoj, ktp. Tiuj kodoj ne nur en la EU gravas: ili validas tutmonde kaj ilia uzos faciligas la laboron de bankistoj kaj ege limigas la riskon de eraroj.

**Recenzo**

**Filmo pri Profesoro Reinhard SELTEN**
**Intervjuo kun Doktoro Rainer KURZ (IKEF 235, estrarano)**

Pli malfrue ol esperite aperis 55-minuta videofilmo en kiu Rainer Kurz intervjuas la Nobelpremiiton pri Ekonomio 1994.

Post mallonga impreso pri Bonn ĉe la Rejno, la tiea Altlernejo pri Ekonomiko, ties laboratorio, kaj la domo de prof. Selten in Königswinter, la videobendo pleniĝas per la tre interesa intervjuo al kiu Rainer Kurz submetas la nun 73-jaran profesoron. La filmo estas sufiĉe statika, sed la enhavo de la intervjuo garantias, ke la spektanto sekvas ĝin fascinita.

Prof. Selten aperas sur la ekrano kiel ĝentila, modesta kaj trankvila persono kiu regas sin konstante kaj singarde formulas la frazojn en perfekta Esperanto, ĉiam tenante la mienon serioza kun kelkfoja apenaŭ videbla subrideto. Nur en la lasta sekundo de la intervjuo li libere ridegas post la lasta demando de la intervjuanto.

La universitato de Bonn posedas gvidan Altlernejon pri Ekonomio kie studas ĉ. 1900 gestudentoj. Tie prof. Selten estras la laboratorion de eksperimenta ekonomiko. Kiel ĝia direktoro li ĝin kreis kaj plukonstruis aktive kaj inovative. En la laboratorio la gestudentoj sin ekzercas per 'decidludoj' kiuj ludas rolan en la ekonomiaj decidoj. Ili baziĝas sur la 'ludoteorio', nova kampo de scienco, evoluigita de prof. Selten. Li mem klarigas

ĝin kiel matematikan metodon por modeligi kaj analizi situaciojn, kiuj entenas konflikton aŭ kooperacion. Prof. Selten emfazas, ke ankaŭ ĉi tiu matematika teorio apertenas al la scienca fako. Ĝi priskribas raciajn kondutojn de homoj kaj aplikiĝas en multaj kampoj kiel ekonomio, merkatumado, politiko (koaliciiĝoj, elektaj kampanjoj) kaj biologio (natura selektado).

Selten ne estis la unua sciencisto kiu okupis sin pri ĉi tiu fako. Jam en 1951 ekzistis la kooperativa ludoteorio, kiu kovras la intereson de kooperativaj partoprenantoj, sed oni perdis la atenton ĝis en la sepdekaj jaroj Prof. Selten modeligis kaj ellaboris la teorion. Li faris tion tiom serioze kaj profunde, ke en 1994 li ricevis la Nobelpremion pri Ekonomio.

Li nun koncentriĝas je la adaptiĝo de la ludoteorio al la fakto ke la homa konduto ne estas tiel racia kiel oni supozis, kio gvidas al la filozofia vidpunkto 'kio estas racieco'. Ŝajnas al mi, ke la ludoteorio rilatas al la racia elektoteorio: homoj atentas en- kaj elspezojn kaj sian propran motivadon. Involviĝas informado, kogno kaj sociaj sistemoj.

Kviete Prof. Selten parolis pri sia matematika studo, pri siaj eksterlandaj kontaktoj, pri la fakto ke li ricevas siajn bonajn ideojn dum promenadoj en la montaro. Li studis pli longe ol strikte necese, ĉar li havis tiom da aliaj interesiĝoj. Tiel li ekzemple ankaŭ psiĥologion studis. Kaj lia eldiro ke oni ne atingas la celon se oni alstrebas ĝin, sed nur se oni entuziasme laboras, signifas por mi ke li ankaŭ interesiĝas pri filozofio. Kaj kompreneble pri Esperanto!

Entuziasme sed penseme li rakontas, ke li lernis Esperanton en 1947 aŭtodidakte per folio kun la 16 reguloj kaj vortaro, kiel li renkontis sian edzinon en la Esperantomova-do, pri sia rolo en la frankfurta Esperantovivo, ke li estas dumviva membro de UEA, ke li legas multon en la internacia lingvo...

Je demando pri la estonteco de Esperanto li akcentas ĝian propedeŭtikan valoron pro la lingva orientigo kaj deklaras, ke kvankam nenio estas certa, li forte esperas, ke Esperanto ricevos la meritita rekonon.

Li ricevis sian hororan premion pro la ludoteorio, sed el la filmo klare montriĝas, ke lia ligiteco al Esperanto ne estas pli malforta ol al lia ludoteorio. Racie li ĉion priparolas. La granda kontribuo de ĉi-tiu videofilmo estas ne nur ke ĝi bone prilumigas simpatian Nobelpremiiton, sed ankaŭ montras ke Esperanto meritas sian lokon en la mondo.

Germana Esperanto-Asocio, IKEF, Esperantogrupo Munkeno kaj la Esperanto-Federacio de Nova Sudkimrio, kiuj ebligis la aperigon de la filmo, bone



komprenis tion kaj mi povas nur forte rekomendi spekti ĝin atentplene. Tio validas ankaŭ por ne-Esperantistoj, por kiuj ekzistas subtitolitaj versioj.

Inĝ. Kees Ruig, Malden (NL) (IKEF 68)

*Membroj de IKEF kiuj deziras pruntepreni la vidbendon, skribu al la prezidanto f.j.braun(a)t-online.de, kiu kunordigas la dissendon.*

**Opinio de IKEF-membro**

Mi dum intertraktado pri komerco kelkfoje renkontis iujn kun nebonaj intencoj. Ekzemple, dum intertraktado, peranto aŭ bezonanto petas en letero antaŭ-sendi varojn al mendanto. Poste la mendanto daŭre prokrestas la monsendon al la provizanto.
Mi esperas ke venos universala regulo laŭ kiu provizanto ne antaŭsendos varojn al mendanto, sen ke banko de unu lando garantias al alilanda banko la monsendon al la provizanto

Chen jinyin (Chen dinshu), IKEF 302, rete: deichenquanliao(a)sina.com.cn

**Staĝopetoj**

IKEF ricevis du petojn de studentoj kiuj deziras fari staĝon eksterlande:

* 23a jara studentino pri entreprena komunikado, Tamara WARLICH, studinta 4 jarojn ĉe la universitato de Nijmegen, Nederlando (http://kunweb.hosting.kun.nl/concernpages/default.asp), ne estas esperantisto, parolas nederlandan, anglan, francan, germanan, havas komputilan sperton (Microsoft Office, SPSS, diversaj versioj de Windows), posedas maŝinskriban diplomon. Ŝi havas spertojn kiel sekretariino kaj kiel esploristino pri diversaj temoj. En 2003 ŝi finos la studon kaj volas fari tion en Azio, prefere en Indonezio, Tajlando, Malajzio, Vjetnamio aŭ Suda Koreio. Post la studofino ŝi volonte laborus en Azio. Ŝi estos libera ekde julio 2003 por staĝolaboro dum 6 monatoj. Dum tiu duonjaro ŝi volas labori en Azio dum 2-3 monatoj, plenumante esplorojn pri la plibonigebleco de la kvalito de reklamo, propa-gando, komunikado de publikgrupoj (PR) aŭ problemoj rilate al merkatumado. La esplorraporto estos ŝia ekzamena projektverko. Interesitoj (ekz. internaciaj organizaĵoj, entreprenoj kiuj interesiĝas pri komerco kun Eŭropo, ...) bonvolu fakse peti detalajn informojn de Kees Ruig, faksnumero +31-24-358.03.20. Ankaŭ eblas peti rete pere de ikef(a)pandora.be, kiu plusendos.

* Mi estas Emile Kroeger, Kroeger.emile(a)ec-lille.fr, franca studento en 'Ecole Centrale de Lille', kiu lernas Esperanton de kelkaj monatoj. Mi serĉas staĝlokon, prefere en norda Ĉinio (mi studas 'mandarinan', ne 'kantonan'), dum junio, julio kaj aŭgusto 2003. Miaj inĝenieraj studoj rilatas al konstruado (mekaniko, rezisto de materialoj, iom da arkitekturo).

**Anekdoto**

Boeing 747 flugas de Afriko al Eŭropo. Mezaĝa, eŭropa sinjorino sidas apud viro kun bruna haŭtkoloro. Sentante sin malkomforta, ŝi vokas stevardinon.
- Vi metis min apud nigrulo. Donu al mi alian sidlokon.
- Ne plu estas lokoj disponeblaj, sinjorino. Tamen, restas loko en unua klaso. Mi parolos kun la kapitano.
Iom poste ŝi revenas.
- Sinjorino, estas tute escepte ke nia kompanio allasas iun al supera klaso. Tamen, konsiderante la cirkonstancojn, la kapitano akceptis.
Ŝi turnas sin al la sinjoro.
- Sinjoro, bonvolu preni vian mansakon. Mi ĝojus se vi pretus preni sidlokon en unua klaso.

(laŭ AMI, revuo de asocio de kongresorganizantoj, septembro 2002)

**La Merkato rete legebla**

Eksperimente mi dum la pasinta jaro aperigis la tekstojn de La Merkato je www.ikef.org, en formatoj .html aŭ .pdf. Ekde nun ĉiu numero ekde sia pretiĝo estos legebla en .pdf-formato. Mi ankaŭ enretigis la malnovajn numerojn kiujn mi havas en elektronika formato. Por la ceteraj numeroj (proksimume la 30 unuaj, kun tiama nomo 'Laŭokaza Novaĵletero') eblas aperigo en bildo-formato se ekzistas intereso, sed tio postulos pli da homaj kaj teknikaj rimedoj (skanado, retspaco).

rr

**Patentoj**

En LM 73 (julio 2001) aperis 'Mallonga superrigardo de la internacia patent-sistemo', grandparte bazita sur la raporto de kongreso okazinta en Grekio en 1999. Intertempe okazis pluraj similaj kongresoj, kies raportoj ofte, en angla lingvo, estas rete legeblaj. Bona elirpunkto por serĉado de la plej novaj evoluoj estas la retpaĝoj de la Eŭropa Patentoficejo je http://www.european-patent-office.org/.



**Nova retpoŝtgrupo de UEA starigita: Aktivi-en-UEA!**

Ĵus estis starigita nova retpoŝtgrupo de UEA por faciligi enasocian serĉadon de taskoj, projektoj kaj helpantoj. Aktivi en UEA!-dissendolisto celas disinformi pri taskoj kiuj ankoraŭ ne havas respondeculon. Enskribiĝinte vi ricevos aŭtomate la taskopriskribojn kaj vi povos decidi ĉu vi interesighas. Eblas aliĝi je http://abonu.com/catalog/esperanto.aktive. Ankaŭ eblas skribi al taskoj(a)uea.org.

Eblas senpage ricevi mallongajn retpoŝtajn novaĵojn pri la mondo en Esperanto. Anoncu vin ĉe e-inform(a)index.hu, Thierry Salomon, AbonaSoft, http://abonasoft.netfirms.com, abonasoft(a)pro.hu.

Saluton! Mi estas Sergej Ĉeredniĉenko. Mi loĝas en Ukrainio - la ŝtato en orienta Eŭropo. Mi estas 24jaraĝa. Mi tre volus havi laboron en Kanado, Usono, Britio, Novzelando. En junio de 2001 mi finis la Orientukrainian Universitaton kaj nun estas librotenisto en granda ukrainia fabriko en Lugansk.
Ĉu iu havas laboron por mi? Mi scias Esperanton kaj anglan lingvon. Bonvolu ankaŭ helpi mi trovi amikojn-librotenistojn (esperantistojn). Mia retadreso estas: scher2002(a)ukr.net

**Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo...**

...kaj al la nacia landa asocio, la asocio de mia fako, Universala Esperanto-Asocio?

Ekzistas almenaŭ du bonaj kialoj.

• La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio, unuvorte ili laboras por 'lingva demokratio'. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al la nacia, faka aŭ monda asocioj (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

• Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj kaj koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj.

Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras tute nature, ĉar ili estas daŭre informataj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝeblecoj.

**Plia moderna servo**

La revuo Esperanto ekde 2003 estos abonebla ankaŭ en elektronika formato.

Individuaj membroj-abonantoj de UEA rajtos aldone kaj senpage mendi la revuon en unu el la elektronikaj formatoj oportuna por ili: .html, simpla teksto aŭ .pdf. La mendojn akceptas la ret-adreso reto(a)uea.org.

La elektronika revuo estos sendata al la mendintoj rete baldaŭ post la finredakto de la papera versio kaj antaŭ ol ĝi dissendiĝos per ordinara poŝto.

Kompreneble, spertinte la novan servon, ili rajtas ankaŭ rezigni pri ricevado de la papera versio. La elektronika versio de la revuo estos abonebla ankaŭ por la esperantis-toj loĝantaj en B-landoj, kiuj ne estas membroj de UEA aŭ abonantoj de la papera versio de la revuo.

La kosto de la servo estas fiksita kiel duonigita B-landa abonkotizo: 7,50 eŭroj.